Michelangelo Buonarotti,

# La vittoria di amore sulla morte

Quand'el ministro de' sopir miei tanti
Al mondo, agli occhi miei, a sé si tolse,
Natura, che fra noi degnar lo volse,
Restò in vergogna, e chi lo vide in pianti.

Ma non come degli altri oggi si vanti
Del sol del sol, ch'allor ci spense e tolse,
Morte, c'amor ne vinse e farlo il tolse
In terra vivo e 'n ciel fra gli altri santi.

Così credette morte iniqua e rea
Finir il suon delle virtute sparte
E l'alma, che men bella esser potea.

Contrari effetti alluminan le carte
Di vita, più che 'en vita non solea,
E morte a 'l ciel, ch'allor non avea parte.

*Verkinto de tiu ĉi itala poemo estas* MICHELANGELO BUONAROTTI *(∗1475-03-06 – †1564-02-08).*

*Arg-996-2011 (2014-04-21 14:32:59)*

*Pri la verkinto vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Michelangelo`.

Michelangelo Buonarotti,

# La venko de l' amo super la morto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Forpasis ino, kiun mia koro
Sopiris, ege bela de figuro,
Laŭ la decid' ĉiela. La naturo
Ja hontis, vidis ĉiu ŝin kun ploro.

Ho, kie vi nun estas? Detruite
Forsinkis ĉiuj sonĝoj de l' espero.
Nun estas via korpo en la tero,
Sed restos enĉiele vi spirite.

Vi devis morti kiel ĉio dia,
Veninta sur ĉi tiun teron iam.
La morto tamen vin ne neniigis!

Vi vivas, hele brilas gloro via,
Malvualite vi montriĝos ĉiam
En tio, kion vi efektivigis.

*Traduko de la itala poemo "La vittoria di amore sulla morte" de* MICHELANGELO BUONAROTTI *(∗1475-03-06 – †1564-02-08) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04).*

*Arg-996-2012 (2014-04-21 14:32:04)*

*Tradukita en Esperanto de Manfred Retzlaff (Manfredo Ratislavo) en Oktobro de 2000 laŭ la germanigo fare de Grimo, Hermano (Hermann Grimm, 1828 – 1901). Pri tiu vidu la vikipediejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Herman_Grimm`.